# La Pacdefendanto

Nr-o 10. NEREGULA INFORMA CIRKULERG POR ĈEĤOSLOVAKIO – OKTOBRO 1952

---

## Ĉ U L A B A T A L O F I N I S

Depost la lasta landa konferenco de čsl. aktivaj esperantistoj multaj gek-doj firme esperis, ke la intervena komisio, elektita dum la konferenco por agi kun la kompetentaj organoj, finfíne sukcesos savi la pluan ekzistorajton de la porpaca kaj socialista Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio.

Fakte ankaŭ la komisio streĉis sian tutan forton kaj kapablecon por sukcese plenumi sian taskon. Ĝi intervenis en diversaj ministeriejoj kaj en la centra komitato de la ĉsl. komunista partio. Ĝi montris kaj prezentis aron da faktoj kaj argumentoj pri la ĝisnuna fruktodona porpaca kaj porsocialista laboro de niaj anoj. Ĝi skribis leteron al la prezidanto de nia respubliko (ĝis nun ne respondita) kaj ĉiuj, kun kiuj ĝi agis, aprobis kaj ofte eĉ admiris nian grandiozan laboron, opiniante ke se nia afero estus trovinta pli da apogo kaj subteno, ni estus povintaj fari multe pli da laboro. Nenie oni sukcesis konvinki nin pri neutileco de nia laboro – kaj tamen nia penado malfavore finiĝis.

La 19.de aŭgusto estis vokitaj la prezidanto de la landa asocio k-do. Adolf Malík kaj k-do, Tomáš Balda en la ministeriejon por internaj aferoj, kie k-doj oficistoj Kočiš kaj Očadlík deklaris al ili la lastan kaj definitivan starpunkton koncerne la Esperanto-movado: en Ĉeĥoslovakio. Ĝi estas: likvidi libervole la asocion kune kun ĉiuj siaj grupoj kaj same ĉiujn rondetojn, kiuj (laŭ lasta oficiala rekomendo) forlasis sian asocion kaj aliĝis al la lokaj uzinaj kaj urbaj kulturaj kluboj. Pri tiu ĉi decido la centra nacia komitato infomos la regionajn naciajn komitatojn kaj la regionajn komitatojn de ROH (sindikatoj).

La 6. de septembro jam okazis en Praha eksterordinara kunveno de la asocia komitato, kiun partoprenis la delegitoj de ĝiaj grupoj, kiuj ĝis nun ne aliĝis al la uzinaj kaj urbaj kulturaj kluboj, kun jena programo:

1./ Raporto pri la ĝisnuna agado de la intervena komisio, elektita el la partoprenintoj de la labora konferenco, okazinta la 2.12.1951 en Praha.

2./ Propono por libervola disiro de la asocio de esperantistoj en Ĉeĥoslovakio.

3./ Decidi, kio okazu kun la posedaĵo de la asocio kaj ĝiaj grupoj.

4./ Elekto de likvida komitato.

Red. rim.: laŭ nova leĝo, kompetentas la komitato likvidi mem la tutan organizon, sen bezono kunvoki ĝeneralan membran kunvenon (kongreson).

Sabate la 6. de sept. je la 20.h. komencis en Praha la komitata kunveno. Pri la agado de la intervena komisio raportis k-doj Sklenčka kaj Burda. Sekvis akra diskuto malgraŭ la ĉeesto de reprezentanto de la centra nacia komitato. Ĉiuj opiniis, ke la decido estas ne ĝusta. La pres. k-do. Malík mem, estis konvinkita, ke frue aŭ pli-malfrue venos korektigo de tiu decido el de superaj organoj. La plimulto aplaŭde aprobas proponon de k-do Burda kontraŭ la libervola likvido kaj preferas atendi oficialan malperneson.

La pres. k-ado Malík klarigis, ke atendi malpermeson certe kunportos ne agrablajn konsekvencojn por multaj, niaj, ankoraŭ ne sufiĉe klaskonsciaj gek-doj. Se ni libervole likvidas, oni rigardos nin ddisciplinitaj kaj ne ĝenos plu al unuopuloj daŭrigi sian laboron per Esperanto servi al la paco kaj

socialismo. En kontraŭa kazo estas danĝero, ke eĉ tia agado ne plu ebligos kaj se tamen iu kuraĝus iel maniere daŭrigi, li facile povos interplektiĝi kun la leĝoj kaj ĝui konsekvencon. La pres. rekomendas voĉdoni por la libervola likvido de nia movado. K-do. Kožený proponas aldoni al la sciigo por la centra nacia komitato pri nia likvido, memorigon, ke ni opinias la decidon ne ĝustan, ne koordinanta kun la Marksismo kpt. Okazas voĉdono en tiu senco: 23 gek-doj voĉdonas por la libervola disiro, 3 k-doj voĉdonas por atendioficialan malpermeson kaj 18 tute ne voĉdonis.

En la 2.punkto la plimulto decidis donaci la asocian kapitalon al instituto por evoluo de ĉeĥa lingvo kontraŭ la propono de k-do Burda, kiu deziris, ke la monon oni donacu al la ligo de batalintoj kontraŭ la faŝismo, kiu per la mono subtenu niajn k-dojn, kiuj ankoraŭ batalas kapitalistaj landoj. Laŭ plua propono de k-do Burda la komitata kunveno decidis, donaci el la likvidota asocia kapitalo 6.000 Kčs por sanigi deficiton de la grupo en Plzeň, kaŭzitan per aranĝo de internacia solidarechelpo al enkarcerigitaj japanaj k-doj pasintjare.

Elektita komisio, por aranĝi la likvidon de la asocio, kiu estas definita je la 15.oktobro, ekkoencis sian laboron. –

Antaŭ la voĉdono ankoraŭ k-do A. Malík esprimis opinion, ke estas ebleco, se la likvido okazos libervola, ke kelkaj grupoj, kiuj bone laboras, estante jam enmembrigitaj ĉe la urbaj kaj uzinaj kluboj, povos siajn laborojn daŭrigi – kaj neniu ĝenos la unuopajn izolulojn daŭrigi sian korespondadon kil ĝis nun kun eksterlandaj gek-doj. K-do Burda sciigas al la ĉeestantoj, ke li sendis informan k. plendan leteron al la pres. de la registaro, k-do Zápotocký pri la likvido de la Esp.-movado en ĈSR, kaj multaj eksterlandaj k-doj kaj organizoj skribis samajn leterojn al la centra komitato de la komunista partio en Praha.

<u>KION ATENDAS NIA FAMILIO</u>

Per la frunta artikolo atingas niajn eksterl. k-dojn malgaja raporto. Kaj kamen, la situacio ne estas tiom terura. Nia movado estas sufiĉe forta por povi transvivi tiun ĉi akcidenton. Post la likvide de la landa asocio kaj ĝiaj grupoj eble ĉesos ĉiu publika propagando de Esperanto, ne plu aperos propagandaj afiŝoj, gazetoj, flugfolioj kaj ne plu okazos publikaj kursoj. Ĉesos la laŭleĝa organiza vivo.

Tamen tio ne signifas, ke niaj gek-doj nun ekdormu por ne plu revekiĝi. Ekzistas ankoraŭ multaj eblecoj por daŭre labori por la mondpaco kaj socialismo pere de Esperanto. Niaj gek-doj mem serĉu la plej taŭgan vojon sur kiu ili koncentrigu sin a tiu ĉi laboro! Neniu ĝenos al ankoraŭ pli larĝa disvastiĝo de nia internacia korespondado. Jen kampo, sur kiu niaj gek-doj povas plue batali por la ekzistorajto de nia movado! Ni estas starigitaj antaŭ ekzameno de nia matureco kaj ni ne montriĝu kiel malkuraĝuloj, kiuj tuj post la unua bato jam falas teren! Nune ĉiu unuopulo povas montri, kion li sen gvidanto kapablas fari. La mondo per streĉita spiro observas nin. Ni ne estu pesimistoj, ĉiu filo de nia majstro firme stariĝu sur sia posteno. Amasoj da leteroj kaj korespondaĵoj flugu el nia lando al eksterlando. La rekompence ricevotan materialon ne kaŝu en via ŝranko aŭ poŝoj, montru ĝin al viajkonatoj, cirkuligu ĝin en kunvenoj kaj la akiritajn raportojn, kiuj ofte estas altsignifaj, utiligu por aranĝi prelegojn kaj paroladojn, en partiaj kaj aliaj kunvenoj. Tielmaniere vi daŭre vivigas nian aferon kaj akiras adeptojn kaj simpatiulojn per ĝi. Ĉiu el ni fariĝu gvidanto, apostolo, kaj prediku al la nesciuloj. Multaj niaj gek-doj jam instruas private, peras korespondan interrilaton, al organizoj kaj unuopuloj, kiuj ankoraŭ ne konas nian lingvon. Sekvu ilian ekzemplon kaj ne laciĝu en la batalo!

KION EMINENTULOJ DIRAS pri ESPERANTO

Por la disvastigo de literaturo estas nemankeble grava, ke ĝi estu vaste legata en la tuta mondo.

La eksporto de japana literaturo al eksterlando servas al pli bona komprenigo pri Japanio kaj pere de literatureksporto japanaj verkistoj povos ellerni mondecajn vidpunktojn kaj senton. Plue ĝi povas akceladi japanan literaturon al pli bona disvolviĝo. La literaturo estos amata kaj kritikata, ne nur de Japanoj, sed de homoj en la tuta mondo. Tio estas tre feliĉa por la jap. literaturo.

Ĝenerale en jap. literaturo eksterlandanoj emas trovi ekzotikan sentimenton. Sed ne zorgu flati al ilia plaĉo, ĉar tio fakte ne servas diskonigi al ili, kia estas la japana literaturo. Do estas grava, ke ni diskonigu kion ajn, se ĝi estas karakteriza literaturo kaj ne timu, eĉ se ĝi enhavus japanecajojn.

Nuna diskonigo de jap. literaturo okazas plejparte per angla lingvo. Sed en la mondo multaj popoloj uzas lingvojn aliajn. Pro tio mi pensas, estas necesaj alilingvaj tradukoj krom la angla. En eksterlando precípe estas multaj homoj, kiuj parolas Esperanton. Do NI DE NUN FARU TRADUKOJN EN ESPERANTO! Ankaŭ estas tre necesa, ke, kiam ni diskonigas verkojn al eksterlandoj, ni devas klopodi ekscii ties eĥon. Mi konstatas, ke ĝis nun ni ne faris tion, ni nur pafis. Por plibonigi la diskonigon de japana literaturo en la tuta mondo, nia sinteno estis tre unuflanka.

Ibuki Takehito, profesoro de la universitato en K i o t o , Japanio.

Kopiita el la junia n-o, de komuna organo de KANSAI-ligo de Esperanto grupoj "LA MOVADO".

-------------------------

Por frakasi la "leĝon kontraŭ detruema ago" organizis la studentej de la jura fakultato en N a g o y a grandan demonstracion tra la stratoj de la urbo. Ekde la 6.h. okazis publika kunveno en kiu la studentoj instalis esperantan ekspozicion.

Plej impresaj estis ekspoziciaĵoj, ricevitaj de la Ĉina Esperanto-Ligo en Peking, kiuj speciale altiris la atenton de la ĉeestantoj. Tie oni trovis detalajn k. faktajn informoj pri la milito en Koreio kaj la bakteriaj krimoj. Parlamentanino, k-dino Tazima deklaris: "Vi esperantistoj plifortigu vian batalon por la paco, unu el kies gravaj baroj estas lingvo. Vi prenu ekzemplon kaj lernu de la ĉinaj k-doj kaj de la Brita Esperanta Packomitato. La afiŝoj kaj alia materialo, kiujn vi ricevis de ĉinaj esperantistoj egtas admirinde bela kaj nepre kuraĝigas la japanajn-pacbatalantojn. El "LA MOVADO"

# Voĉo de militkrimulo

Mi estas unu el la C-klasaj militkrimuloj en SUGANO-malliberejo. Dum la Pacifika milito mi laboris kiel oficisto de milita administrejo en Nov-Gvinea ĝangalo, aliflanke mi mem prenis pafilon kaj pasigis ĉiun tagon en la plej varmega batalado. La latentaj, sed tamen ne solveblaj duboj k. maltrankvileco rilate al la mond-koncepto kaj militideo, kiuj estis al mi instruitaj kiel absoluta justeco, ĉiam peladis min al furioza agado.

Estis mirakle, ke ni ne mortis ĝis la milito finiĝis malvenke niaflanke, kiam mi ankoraŭ estis sur la batalkampo. Mi estis arestita de nederlanda orienthindia armeo kiel suspektato pri milit-krimo, devigita preni sur min, la respondecon pri iu neatendita okazaĵo dum la operacioj.

Post 3 jara aresto en karcero por juĝotoj mi estis kondamnita al la plejsevera puno - al dudekjara malliberiĝo.

La ekkonscio pri miaj krimoj, kiuj furioze skuis mian tutan ekziston, okazis ĝuste tiam, kiam mi sidanta ĉe malvarma muro en fremdlanda malliberejo, neeviteble pensadis kaj esploradis konscience pri mi mem kaj fine kovinkiĝis, ke efektive ni estis tute ne kredanta je la mondkoncepto kaj gvidprincipoj, kiujn ni havis dum la pasintaj tagoj. Baziĝinte je tiuj principoj kaj kun li lozungo, "Por la paco" oni detruis la pacon mem kaj turnis la historion malantaŭen, farante murdmiliton, en kiu ni mem ludis rolon. Mia mizera memkontrolo estis fundamente detruata kaj kiom da tagoj kaj noktoj mi pasigis en tute neelportebla suferado kaj senespereco!

Jam forpasis sep jaroj de tiam. Mia tuta juneco forflugis sur la batalkampo kaj en la karcero. Nenio en la mondo kapablas al ni revenigi la perditan junecon!

Antaŭ tri jaroj, mi, kiel malliberuloj, metis mian unuan paŝon sur la teron de la terure detruita hejmlando. De post tiam ĝis hodiaŭ, kiam la tiel monata "repaciĝo" estas efektivigita, mi ankoraŭ pasigas la malliberulan vivon kune kun aliaj 900 militkrimuloj. Sed tute kontraŭe al mia deziro kaj mia preĝo en la karcero, la samspeca milito kiel la Pacifika milito, kiu pelis min al la batalejo kaj

faris el mi militkriamlon, nun estas rekaptonta Japanion. Tiaj falsaj informoj, kiaj min trompis kaj minacis antaŭ la lasta milito, nun estas denove pelonta 80, 000.000 da Japanoj en la morton. La liberiga movado por la militkrinuloj, projekciata de la politikistoj kaj kapitalistoj, kiuj ĝis nun tute ne atentis pri ni, prezentas, ĉeneron de la japana rearmado kaj faŝistigo.

Rigardante la tegmentojn de Tokio, kiu mizere ŝanĝis sian antaŭan aspekton, ni cerbumas kaj ni sentas en mi la sangon flui returnen pro freneza indigno kaj malamego, kaj ni krias: - Ĉu denove oni volas lasi la junulojn de la sekvanta generacio sperti la suferojn k. malĝojon, kiajn mi devis eltoleri?"

Mi vidas verajn "malamikojn" en ĉiu fipolitikisto, kapitalisto kaj fiĵurnalistoj, kiuj nun ŝajnigas al ni prepari simpatian movadon. Ili estis kaj estas la faktaj militkrimuloj. La koro de senscia junulo kreskadis en la karcero. Mi nun povas ĝuste kapti kaj taksi ĉion en la historio. Sekve de tio mi deziras alvoki el la fundo de nia koro al mia kara japana popolo: "N e n i a m p l u r i p e t u m i a j n e r a r o j n ! " kaj tial ni preferas resti en la karcero por eterne, se la liberigo aŭ moderigo de punoj al la militkrimulo – nur servus kiel flanka (helpa) rimedo por pravigi la rearmadon.

La fakto, ke la militkrimuloj, malbelaj heredaĵoj de la 2. mondmilito, ekzistus por longa tempo, povas servi kiel bremso kontraŭ la rearmado. Se mi povus tiucele esti utila, ni volonte restados plue en la karcero.

Estus granda ĝojo eliri el ĉi tie. Miaj maljunaj gepatroj, kiujn mi depost dek longaj jaroj jam ne vidis, nur atendas nian revenon.

Sed mi ne volas interŝanĝi la de novan tragedion de la japana popolo kun mia propra feliĉo.

En la komenco la aliancaj armeoj, punante nin, deziris krom venĝi, ke ni renaskiĝu kiel veraj demokratoj kaj pacifistoj. Sed nuntempe la cirkonstancoj estas tute renversitaj.

El la ŝajne malluma perspektivo, tamen mi sentas la potencon de la nevenkebla volo kaj la spiriton de la forta rezistado de la popolo, leviĝi kaj kuntiriĝi por la defendo de la paco, kaj mi firmr kredas, ke la vasta kaj senkompromisa movado de la konscia popolo fariĝos decida elemento por sufoki la militinstigantojn kaj garantii la pacon!

El jap. revue, SEKAI (mondo) traduko de Hirokazu Kaĵi. Ni kopiis el "LA MOVADO".

--------------

D I M I T Á R J O N K O V M I R O V

bulgara k-do, al kiu ni, laŭ raporto en nia lasta n-o, sendis medikanentojn, respondas:

"Hieraŭ mi estis surprizita de ĝoja sciigo, ke la senditaj kuraciloj 750 tabledoj „PAS" k. 2,000.000 da unuj de penicilino atingis la doganejon Ruse. Tio ĝojigis ne nur min, sed ankaŭ nian familion kaj arnikojn al kiuj mi raportis, ke vi, grupo de gesamideanoj el la frata Ĉeĥoslovakio sendis al mi senpage ĉi kuracilojn. Mi estas kortuŝita de tiu ĉi via nobla faro per kiu vi esprimis vian humanecsenton kaj intencon servi al internacia solidareco kaj kamarada interhelpo.

En tiu momento mi ne povas trovi vortojn por esprimi dankemon kaj ĝojon al la gesamideanoj de via urbo Plzeň. Mi skribos pri tiu bona afeero al nia bulgara Esperanto-asocio en Sofio, por ke ĝi pri tio raportu publike.

Via sincera kaj ĉiam dankem bulgara kamarado

D i m i t á r

AL K-DO CSÁDER – BRATISLAVA

kiu festas la 16. de oktobro 1952 sian 50jaran naskiĝtagon kaj samtempe 30jaran jubileon de sia esperantistiĝo, ni gratulas en la nomo de la redakcio kaj EL POPOLA ĈINIO, dezirante al li ĉion bonan kaj feliĉon kaj multan sukceson en lia fervora por- kaj per-esperanta agado.

La redakcio

MALFRUE sed TAMEN

atingis mian redakcion detala raporto pri la printempa foiro ĉe la BRITA PACKOMITATO en London. La ĉefan meriton pri la bona sukceso rikoltas k-dino F. Paraige, kiu prizorgis preskaŭ sole la tutan aranĝadon. Belega budo enhavis donacitajn objektojn el multaj landoj. Precipe favore kontribuis gek-doj el Svedio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Polio, Islando kaj Germanio. Sendaĵoj elaliaj landoj venis kun malfruiĝo. La Brita Packomitato profitis de la Esperanto-stando pli ol 33 fundojn da Sterlingoj kaj la morala profito de la Brita Esperantista packomitato estas ankoraŭ pli valora, ĉar multaj prominentuloj el la pacmovado kaj partoprenintoj de la foiro konvinkiĝis, ke Esperanto kapablas fari gravajn servojn, se oni scias ĝin praktike eluzi.

INTERNACIA ESPERANTO EKSPOZICIO

okazos en la Kyŭsyŭ universitato de Hakozaki-Hukuoku en Japanio. La gek-doj, kiuj sendos taŭgan materialon, t.e. afiŝoj, infandesegnaĵoj, fotoj, bildkartoj kaj simila ricevos rekompence japanaĵojn. Laŭ raporto de k-do Acuŝi Hoŝida la E-movado enJapanio rapide progresas La Kanzaija ligo de Esperanto-grupoj okazigis en ĉiuj grandaj urboj de Kanzai Esperanto-kursojn. Funkcias kursoj en Kioto, Suita, en Tojanaka, Osaka, Nara, Niŝinomija, Omagasaki kaj Koobe. Nur en Osaka lernas 100 kursanoj, en Koobe 40. Inter la esp-istoj regas granda ĝojo pri tiuj sukcesoj. Multaj el ili deziras nun korespondadi kaj interŝanĝi propagandan materialon por firmigi la internacian solidarecon kaj batalojn por la paco. Ankaŭ infanoj volas interrilati. Skribu pri tio al k-do: Acuŝi Hoŝida ĉe ESPERANTISTA RONDO DE KYŬSYŬ UNIVERSITATO, Hakoza-KI, HUKUOKA, JAPANIO.

KIO OKAZOS KUN "EL POPOLA ĈINIO?"

Certe tiu gazeto daŭre atingos niajn abonantojn. La ĉina administracio intertraktas kun nia ŝtata librovendejo "ORBIS", ke tiu akceptu la distribuon por nia lando. En tiu kazo estos necese, ke ĉiu abonanto egaligu sian ŝuldon ĉe la landa peranto, por ke tiu povu poste en bonordo transdoni la abonantaron. Eble ankaŭ la ĝisnuna peranto nur kontaktos kun ORBIS pere je kiu li transferos la pagojn al Ĉinio.

" L A   P A C D E F E N D A N T O "

Estas duba, ĉu post event. likvido dela rondeto en Plzeň tiu ĉi ŝatata bulteno trovos ankoraŭ eblecon plu aperi. Laŭ niaj leĝoj unuopulo ne rajtas eldoni gazetojn aŭ aliajn presaĵojn. Kontraŭaganto povas sperti konsekvencojn. Kiu klubo aŭ rondeto havos ŝancon al plua ekzisto, tiu rajtus daŭre ĝin eldonadi. Ni estas pretaj transdoni ĉion en bona ordo. K-do Burda, la ĝisnuna redaktanto eĉ promesas daŭrigi aŭ almenaŭ aktive kunlabori en la redakcio por la nova eldononto.

Pripensu gek-doj la aferon kaj ekagu tuj! Kontaktu pri tio kun nia redakcio en plej proks. tempo.

B R N O , la Esp.-rondeto ĉe kleeriga societo Komenský en Brno aranĝis prelegon de k-do profesoro Josef Kožený la 27.9.1952 en hotelo "Passage" pri Stalina instruo de lingvoscienco kaj internacia lingvo.

K O P Ř I V N I C E , la Esp. klubo ĉe la uzina kultura klubo TATRA Kopřivnice malfermis la 28.9.52 Esperanto-muzeon en la kadro de la Laĥia muzeo en Kopřivnice.

O L O M O U C , la Esp. rondeto ĉe la urba kleriga klubo en Olomouc aranĝis la 25.9.1952 publikan diskuton pri Esperanto. Detala raporto ankoraŭ ne atingis la redakcion.La 30. komencos kursoj en la gimnazia lernejo de Polívka.

B R N O , komencis kurso por komencantoj kun 21 lernantoj, instruas ĉiu vendrede de 18.30 horo k-do J. Vondroušek.

V S E T Í N , la klubo aranĝos dum aŭtuno kelkajn kursojn por komencantoj. 15 membroj regule kunvenas ĉiu merkrede je la 20.h. en klubejode la Teatro "Ž". Ĉiuj anoj vigle korespondas kun eksterlando. La akirita materialo servas propagande en ekspoziciaj fenestroj.La klubon gvidas k-do Aleš Berka, Rybníky 1234, Vsetín.

P O P R A D , la somera Esperanto-kolegio ankaŭ tiujare kontentigis pri sukcesplene aranĝitaj someraj kursoj. Partoprenis 70 personoj.

Plzeň, la rondeto ĉe la urba kleriga klubo funkciigis kurson por 6 lernantoj, instruas k-dino Pavla Maroušová. En privataj loĝejoj gvidas kurson k-do Novák kaj Proskovec Ladislav. La 23 de oktobro okazos publika diskuto pri  Esp-o.

Fondiĝis rondeto de amik.Oriento.

# Korespondi deziras

K-do Aleks Šmigura, 18j., studento, komencanto, BÁNOV 498, pri Nových Zámkoch, Slov. Ĉeĥoslovakio, per il. p.k.. Kun la tuta mondo, certe resp.

K-do Hideo Nokam 564 Hakanosima Wakayomasi, Japanio, peras infanleterojn, desegnaĵojn el tuta mondo. Ĉiu sendaĵo estos rekompencota.

K-do Bertet Robert, 30 rue de Perronne, CASABLANCA, Maroko, peras il. p.k. por siaj infanoj.

K-do Masao Yoshimoto, N-o 22 Minami kasuga-cho, Sai, ukio-ku, KIOTO, Japanio, peras infanleter. el ĉ. 1desegnon, afiŝon, fotoj, il.p.k. al jap. infanoj, kiuj respondos japanlingve kun aldono de Esp.-traduko

K-dp Milosl. Přenosil, Na Výspě n-o1287, TACHOV, Ĉeĥoslovakio, koresp. kaj interŝ. p.m. kaj il.p.k.

K-do Josef Kalčík, Česká 1148, TACHOV, Ĉeĥoslovakio, interŝ.p.m.

K-do Neico Todorov Neicov "Luben Karolvolov"14, Bourgas, Bulgario, interŝ. seriojn da uzitaj kaj neuzitaj p.m., il.p.k. gazetojn, fotojn ktp. kun ĉiuj landoj.

K-do Bulín Bohuslav, Na Roudné, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, 10jarulo, per leteroj kaj il.p.k. kun infanoj.

K-dino Horáková Marie, 13jara, Na Roudné č. 26, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, per leteroj kaj il.p.k. kun ĉiuj land.

K-do Šťastný Pavel, Němejcova č. 4, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, 12jarulo, p.k.il., desegnaĵojn, fotojn ktp. kun ĉ. landoj

K-dino Olga Marešková, Radčická 15, PLZEŇ, Ĉeĥosl. 14jara, kun ĉiuj land.

K-dino Šneidrová Marie, 14jara, Na Prádle č. 5 PLZEŇ, Ĉeĥosl. interŝanĝ. desegnaĵojn, il.p.k. ktp. kun ĉiuj land.

---

Eldonas: OSVĚTOVÁ BESEDA – KROUŽEK ESPERANTISTU V P L Z N I
Redaktas: K-do Rudolf B u r d a , Palackého nám. č. 6, PLZEŇ
Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O

E S T A S A N K O R A Ŭ T E M P O , R A P I D U A Ĉ E T I :

195 paĝan ĉinan broŝuron " Por Nova Afero per Nova Maniero" por 20,-
56 paĝan ĉinan broŝuron "La plej forta voĉo de la paco" por 10,- Kčs
10 divers. malnovaj kajeroj de EL POPOLA ĈINIO por 20,- Kčs

Mendu tuj ĉe nia redakcio kaj ne forgesu aldoni poŝtmarkon!!!!!

Al eksterlando ni ekspedas kontraŭ samvaloraj esperantaĵoj, libroj.